

Inform- kaj instruvojaĝo al Nikaragvo 2013 / Kompleta raporto

Resumo por mallegemuloj:

- Inform- kaj instruvojaĝo de Martin Schäffer al Nikaragvo; 4 ĝis 20-02-13;
- finance subtenita de fondaĵo Esperanto Internacia;
- Esperanto-kursoj en la nacia universitato post la 9-a de marto 2013;
- 2 radio- kaj 5 televidintervjuoj en plejparte tutlandaj kanaloj;
- Ĉirkaŭ 30 homoj registriĝis por la kursoj; pli ol 50 homoj petis informojn.
- Esperanto-kursaro (tri semajnoj en januaro 2014)
- Okazigo de 1-a Esperanto-kongreso en Nikaragvo (januaro 2014).

Pli detala teksto:

Ankaŭ en 2013 okazis inform- kaj instruvojaĝon al Nikaragvo, danke al la subteno de la fondaĵo Esperanto Internacia. Surloke min subtenis Uriel Gurdíán, kiu instruas Esperanton en la UNAN (Universitato Nacia Aŭtonoma de Nikaragvo). Krome ni havis la helpon de profesia ĵurnalistino.

Menciindas, ke la kursoj en la UNAN estas rezulto de niaj kontaktoj kun la universitato dum la lastjara vojaĝo, kie mi kaj Mallely Martínez partoprenis en la 3-a Nacia Kongreso de Edukado. Tiel ni ekhavis kontakton kun la dekanato de la fakultato pri lingvoj kaj la estrino de la fakultato pri la franca lingvo. Je la 9-a de februaro okazis renkontiĝo en la UNAN kun 12 personoj, kiuj partoprenis la lastjarajn kursojn. Samtempe ni anoncis la okazigon de nova kurso, kiu komenciĝos je la 9-a de marto 2013.





Gravega afero por la daŭra evoluo de Esperanto en Nikaragvo estas, ke la estrino de la franca fakultato promesis daŭran subtenon kaj permesis al ni organizi kursaron de Esperanto en januaro 2014. Inter la 6-a de januaro ĝis la 24-a de januaro 2014 okazos intensaj kursoj en la UNAN, kiuj estas malfermaj ankaŭ por eksterlandanoj laŭ la stilo de NASK kaj Esperanto-insulo. Tuj post la kursaro okazu la 1-a Esperanto-kongreso en Nikaragvo (internacia), kiun ni planas organizi en la turisma urbo Granada.

La kontaktoj kun la gazetaro estis intensaj. Aperis 5 televidaj intervjuoj kaj du radiointervjuoj. Pliaj intervjuoj kaj raportoj aperos en la venontaj semajnoj. Jen la detaloj:

- 1) Canal 12 (nacia televido per kablo kaj anteno)
- 2) Canal 14 (nacia televido per kablo).
- 3) Canal 8 (nacia televido per kablo kaj anteno)
- 4) Radio Maranatha (ofte aŭskultata grava radiostacio).
- 5) Canal 2 (nacia televido per kablo kaj anteno; intervjuo aperis en la "Novaĵoj")
- 6) Canal 13 (nacia televido per kablo).
- 7) Radio Ya (nacia kaj vaste aŭskultata radiostacio).

En ĉiuj intervjuoj ni informis pri la retaj kursoj kaj pri la kursoj en la UNAN. Post la intervjuoj pli ol 50 homoj kontaktis nin kaj ĉirkaŭ 31 personoj registriĝis por la kursoj en la UNAN (nacia universitato de Nikaragvo).

La vojaĝon finance subtenis la fondaĵo Esperanto Internacia, kiu laboras ĉefe sur la kampoj de Esperanto-instruado kaj –informado. Krome danke al la helpo Katalin Kovats kaj Synnöve Mynttinen kaj Tamás Slezák mi povis transdoni 40 ekzemplerojn de la Poŝamiko. Mi dankas pro financa kaj organiza helpoj kaj mencias ke daŭre la movado en Nikaragvo bezonas vian subtenon. Vi povas kontribui al la UEA-konto eint-o. Por aliaj pagvojoj (bankĝiro aŭ Paypal) bv. viziti: <http://www.adresaro.org/enhavo/donacoj>. Bonvenaj kompreneble ankaŭ estas librodonaĵoj.

Raportis: Martin Schäffer